



Katherine Mansfield
 (1888-1923)
 Novzelanda verkisto



Esperanto sub la Suda Kruco

Septembro-Oktobro 2004
 Numero 71 (Volumo 12, no.5)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 71 (volumo 12, numero 5), Septembro-Oktobro 2004

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

Telefono: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝte: sudakruco@westnet.com.au

Libroservo

Libroservo de AEA, esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.

E-poŝte: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.

E-poŝte: hazgreen@twmba.net

NOVA E-POŝTA ADRESO DE *ESK*

Pro problemoj rilate al la antaŭa servilo, la e-poŝtadreso de *ESK* nun estas:

sudakruco@westnet.com.au.

Ni petas ke ĉiuj korespondaĵoj kaj artikoloj por *ESK* estu sendataj al tiu adreso. Bonvolu laŭeble, uzi Unikodon por viaj kontribuaĵoj.

(Alternative, oni povas ankaŭ sendi al la paper-poŝta adreso: PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.)

SUR LA KOVRILO

Katherine Mansfield (1888-1923) estis unu el la plej influaj novelistoj en la 20-jarcenta anglalingva literaturo (kaj, paradokse multe populariĝis en ĉinlingvaj tradukoj). Inter ŝiaj ĉefaj novel-kolektoj estis *Filinoj de la bedaŭrata Kolonelo* (1921) kaj *La ĝardenpartio* (1922). Plejparte ŝiaj verkoj havis aŭtobiografian fonon el Nov-Zelando.

EN ĈI TIU NUMERO

Universala Kongreso 2004 en Pekino (Sandor Horvath).....	3
Vizito al Kakadu (Franciska Toubale).....	6
Novaj konkursoj: (1) facila.....	2
(2) malfacila.....	9
European Parliament.....	9
Aventuroj de kopenhagano (Bob Felby).....	10
Gravaj anoncoj [+☺].....	14
NZEA kongreso [+☺].....	15
Diverseco kontraŭ malvarieco (Marcel Leereveld).....	16
Book Review: <i>The friend from Kananam</i>	18
Recenzo: <i>Edu-ko-do</i>	19
Skribas la legantoj [Volo Gueltling] [+☺]	20
For the Beginner: Jargon (3).....	21
Nekrologo: Stan Bruton.....	25
Nekrologo: Desmond Langman.....	25
<i>Pasporta Servo</i> ; Savu Radion3zzz.....	26
Internacia fotokonkurso.....	27
El la regionoj.....	28
Odlo Bokserp.....	29
Limdato por la novembro-decembra numero: 15 oktobro.	

IMPRESOJ, KOMENTOJ, PENSOJ PRI ĈINIO KAJ LA 89a UNIVERALA KONGESO

fotoj kaj teksto de Sandor Horvath



Ĉe la Granda Muro de Ĉinio

Ivan Heldzingen, Heather Heldzinen, Esther Parris, Sandor Horvath

- Mia unua vizito al la lando kun kvinono de la monda loĝantaro. Nekredeble ke 10 urboj havas loĝantaron de pli ol 4 milionoj, 23 el ili: 2-4 milionojn, 138: 1-2 milionojn.
Mi tuj povis senti la grandan amason da homoj.
- Estis nekutime bonega sento bicikli inter tiom da lokaj biciklistoj. La trafikreguloj ŝajnas nur proponoj kiujn oni povas sekvi aŭ ne. Tamen, mi devas konfesi ke post kelkaj tagoj ankaŭ mi komencis ne halti antaŭ la ruĝa luma aŭ bicikli sur la malĝusta flanko de la strato. Kiel la ĉinoj.
Tamen, bedaŭrinde, la aŭtomobiloj estas venkantaj.
- La ĉinoj diras “hunda furzo” anstataŭ nia kutima “bova fekaĵo”(bullshit) Do, kial ne?

- Kelkaj virinoj ne nur razas sin sur “gravaj” lokoj, sed ili ankaŭ uzas (venenan?) kremon por tute haltigi la kreskadon de siaj haroj. Kial?
- Ekzistas du milionoj da aŭtomoboloj nur en Pekino.
- Ĉinio havas 600 McDonaldojn kaj 1000 KFCojn. Kial?
- La Granda Pando kun nigraj kaj blankaj haroj povas pezi pli ol 135 kilogramojn. Nun restas nur iom pli ol 1000 pandoj.
- Ĉinio havas 56 oficialajn naciplimultojn.
- Ege evidentas la diferenco inter la riĉuloj kaj malriĉuloj. Kelkaj ne tute hontas montri siajn riĉecon. Samtempe videblas okulfrapa malriĉeco. Ekzemple, multe da homoj kiuj portas grandegan kvanton da aĵoj sur tricicloj por tre malmulte da mono.

Bona memorigo pri mia relative privilegia posicio.

Do la Universala Kongreso mem?

Mia kvina. En Adelajdo mi ofte pensas ke mi konas preskaŭ ĉiujn esperantistojn. La UK refoje estis bonega memorigo ke ekzistas vastega, de mi nekonata, esperanto-mondo “ekstere”.

La ĉinoj vere penis organizi memorindan kongreson. Ili sukcesis.

- En la kongresejo troviĝis granda, informoplena, interesa ekspozicio: “Konu Ĉinion, vizitu belan Pekinon.” Ofte ĉinoj fotis nin antaŭ la afiŝo de sia regiono. Preskaŭ ne necesis vojaĝi tra la tria plej granda lando en la mondo.
- La Nacia Vespero estas unu el la kulminoj por mi: akrobatoj, pekina opero, kantado, kostumoj,...kaj ĉio terure altakvalita.
- Niaj kvin aŭtobusoj ekskursantaj al la Granda Muro estis akompanataj de du policiaj aŭtomobiloj.

Mi partoprenis la diskutojn pri la kongresa temo:

“Lingva egaleco en internaciaj rilatoj”.

Mi ŝatas la ideon de Humphrey Tonkin ke Ĉinio devus celi dulingvan solvon por internaciaj rilatoj: la angla lingvo por la nuna praktika internacia vivo, sed esperanto por konstrui novajn egalecajn internaciajn rilatojn.

Tion mi ankaŭ kutime proponas al miaj eksterlandanaj instruistoj.

Nia Kep Enderby estis elektita membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. (Ĝi konsistas el esperantistoj kiuj havas eminentan pozicion ekster la esperantomovado.)

Dum mia restado en Ĉinio mi prizorgis Gisin, 16-jara knabino el Aŭstrio.

Ŝi bone progresis dum la kongreso. Ofte multe da ĉefe ĉinaj junuloj interesiĝis pri ŝi. Tiel mi konatiĝis kun multe da ili kaj sentas min iomete pli optimisma pri la esperanto-junularo.

UEA havas novan estraron. 4 el Eŭropo, 2 el Azio, 1 el Kubo. Eble la unuan fojon la plimulto estas virinoj (kvar el sep).

Mi daŭrigis mian klopodon trovi esperantisto(j)n el unu el la ĝemelaj urboj de Adelajdo por nia venonta somerkursaro en Januaro 2005. Eble.

Refoje mi konsciis ke la UK iel spegulas la mondon. Preskaŭ nur la riĉaj landoj estas reprezentitaj.

Partoprenis en la UK eĉ reprezentanto el Afganio. Tamen estas nur unu persono el Afriko en la kongresa libro.

Kaj refoje mi aŭdis pri homoj el “riskaj” landoj, kiuj havis grandajn mal-facilaĵojn akiri vizon. Multaj ne sukcesis. Kion fari? Almenaŭ, paroli.

Traleganta kion mi skribis, mi sentas ke preskaŭ ne eblas speguli la etoson de universala kongreso.

Iru mem venontjare al Litovio. Ili atendas pli ol 3000 homojn. Estu unu el ili.



Ĉe la kongresejo

Indrani Beharry-Lall kaj Sandor Horvath



VIZITO AL KAKADU

de Franciska Toubale

Ankoraŭ ĉi-jare Helen Palmer forlasis Adelajdon por labori kiel medigardisto en Nacia Parko Kakadu, do mi pensis ke estis bona oportuno por malkovri tiun parton de la lando kaj decidis viziti ŝin.


Mi alvenis la 1an de julio, je la tago kiam la Norda Teritorio festas per kradrostado kaj piroteĥnikaĵo sian kreigon. Fakte mi elektis la malvarman sezonon (Wurrngeng, laŭ la tradiciaj loĝantoj). La temperaturo atingas tamen 30°C, sed la aero estas seka kaj agrabla, ĝuste tia, kia estas dezirata por naĝi apud la fiŝoj en la ege klara akvo de rivereto en la musona¹ arbaro. Tie estas unu el la malmultaj lokoj, kiujn la krokodiloj ne vizitas. Ili preferas la laĝetojn de la ebenaĵoj, kie la akvo iom post iom vaporiĝas samtempe kiam la varma sezono, Gurrung, alproksimiĝas, aŭ la pli grandajn riverojn, kiuj kondukas al la maro.



Krokodilo en "Yellow Water"

Se vi estas ŝatanto de birdoj, Kakadu estos por vi paradizo. Multas la specoj, de la malgranda nigra birdo, kiu balancas sian voston, aŭ la alciono kun brilaj koloroj, ĝis la granda cikonio, Jabiru, sen forgesi la "jesuan" birdon, kiu, dank' al siaj longaj kaj maldikaj piedfingroj kapablas iri sur la folioj de nimfeoj sen puŝi ilin en la akvon. Por scii kion signifas pacienco, rigardu la egretajn ardeojn, kiuj staras dum horoj sur la rando de la akvo ĝis ili ekflugas kun fiŝo en la beko.

Ne eblas tute libere vagi en tiu parko, ne nur pro la sezonaj fajroj

1. Musono = Vento kiu regule kaj periode blovas en intertropika regiono. [Laŭ NPIV].—


ekbruligataj ĉiun tagon en diversaj lokoj laŭ la tradicio, sed pro tio ke la lando daŭre estas la teritorio de la klanoj kiuj loĝas tie jam de 20 000 jaroj aŭ pli. Estas multaj sanktaj ceremoniejoj, kies sankteco devas esti respektita de la turistoj. Tamen eblas admiri plurajn artogaleriojn. La ruĝaj, flavaj aŭ blankaj pentraĵoj estas pentritaj rekte sur la rokoj, ofte unu super la alia. Per ili eblas kompreni la vivon de la loĝantoj kaj la evoluon de la loko

Kvankam la praloĝantoj bone flegis la teron, ili ne malhelpis la enkondukadon de bestoj, kiuj difektis kaj ankoraŭ difektas la riverbordojn, ekz. la bubaloj aŭ la porkoj.

Pro pafado la bubaloj preskaŭ malaperis kaj plantoj reaperas, sed la lertaj porkoj scias ke se ili restas en lokoj vizitataj de la turistoj ili ne riskas mortpafadon.

La laboro de Helen estas tre interesa sed laciganta. Ĉiun tagon ŝi iras al malsama loko por informi la turistojn pri la aborigena kulturo, la bestoj aŭ la artaĵoj. Foje ŝi restas en Kultura Centro Bowali por respondi al ĉiuj demandoj. Eĉ vespere ŝi montras lumbildojn en la tendumejoj. Akompanas ŝin aŭ junaj aborigenoj, (ĉar unu el la devoj de la medigardistoj estas trejni la lokajn gejunulojn tiel ke ili povu poste labori en sia teritorio), aŭ maljunulino, kiuj povas aldoni detalojn kaj anekdotojn dum la parolado.

Helen ĉiam portas verdan stelon sur sia ĉemizo, ĉar unu el ŝiaj revoj estas ke turisto rekonos la simbolon kaj alparolos ŝin esperante. Ĝis nun tio neniam okazis. Sed pro tio ke ni konstante kune parolis esperanton, aparte post la alveno de Sandor Horvath, pluraj homoj petis informojn pri ĝi. Ĉu ilia scivolemo estos fruktodona?

Ĉiukaze se vi deziras malkovri Nacian Parkon Kakadu ne nur laŭ la vidpunkto de turisto, mi rekomendas al vi profiti de la nuna oportuno. Iru kaj renkontu kleran medigardiston, kiu plie klarigos ĉion al vi ...en esperanto. □



Helen en Centro Bowali respondas la demandojn de turistoj

NOVA KONKURSO FACILA

“Bonvolu Korekti”

Premietetoj ricevblos



En la sekvaj frazoj mia komputilo faris erarojn. Mi estos ege danka al ĉiu, kiu helpos min trovi ĉiun eraron, do korekti la frazojn:

1. Rozkolera aŭroro. 2. Mola karesema bateto. 3. Lia parolo estis kurba kaj konvinka. 4. Lin ege ĝojigis ŝia salato sur la strato. 5. Interruladaj pretendoj. 6. Elspezinte lastan doloron, li ĉagreniĝis. 7. Lia granda liberkapablo estis mirinda por la kunlaborantoj. 8. Ĉi tiu bazara bubo bezonis riparon. 9. Teda bizara bruoj. 10. Fiere spiris la bruto de la venkinto. 11. Ŝi trankvile rastis karoton por la barĉo. 12. La estro volonte simulis ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoj. 13. Simplaj kaj apelitaj literoj. 14. Sango de la prezidento ne devas okazi. 15. Li ofte deliris ŝin vidi. 16. Li havis kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj prepozicioj. 17. Ilin ege timigis neatendita blago. 18. Lia eta filio estis trista. 19. La razisto forrabis lian barbon. 20. Ili sukcese provis ĉiujn erarojn.

La strangan karakteron de la komputilo, kiu emas fari erarojn, demonstris Grigorij Berezin (Ukrainio). [El La Ondo de Esperanto junio 2004.]

Al ĉiu aŭstraliazia leganto de *Ĝ&K* kiu sendos al ni seneraran korekton de ĉiuj frazoj, la redaktoro sendos (laŭ sia propra elekto) libreton esperantolingvan¹.
Limdato por la alsendo: 15 decembro 2004.

1. Ni devas fidi al la respondantoj ke ili ne konsultas la jam aperintan respondaron en La ondo de Esperanto.

NOVA KONKURSO NEFACILA

SPECIALA

Verku por ni pli-malpli sencohavan rakonton, en kiu vi utiligas laŭorde ĉiujn *nekorektitajn* frazojn el la “konkurso facila” sur paĝo 8.

La rakonto estu minimume 850-vorta, kaj en bona esperanto. (Do vi devos cerbumadi por trovi rimedon utiligi kelkajn el la nekorektitaj frazoj!)

Via rakonto povas esti sprita, ŝerca, parodia, serioza, historia, aŭ kia ajn.

La konkursaĵoj devos atingi la redaktoron antaŭ la fino de merkredo la 15a de decembro 2004. Sendu ĝin e-poŝte al: sudakruco@westnet.com.au, aŭ al P.O. Box 643, York WA 6392, Aŭstralio.

Ĉiu sendinto de akceptebla rakonto ricevos veran premion: unu aŭ pli da grandaj esperantolingvaj libroj, kiu(j)n la verkinto de la rakonto povos elekti el listo provizota de la redaktoro de *ĜJK*.

Ne necesas partopreni en la “konkurso facila” por partopreni en ĉi tiu “konkurso nefacila”.

Premiitaj rakontoj estos publikigitaj en *ĜJK*. □

EUROPEAN PARLIAMENT OPENS WITH FIRST ESPERANTO-SPEAKING MEP

When the European Parliament formally reopened on Tuesday (July 20, 2004) they had amongst their members, probably for the first time, a fluent speaker of Esperanto. Margareta Handzlik is a representative of the Silesia Region in Poland, and was put forward as a candidate by the Citizens Party [Platforma Obywatelska].

Margareta Handzlik has spoken Esperanto for twenty years, though she has never attended an Esperanto course; she learned the language during her travels with her husband, Georgo Handzlik, who is a popular Esperanto singer, writer, publisher and teacher. Now Esperanto is a part of her life.

"Some Esperantists have written that I am the first Esperantist member of the European Parliament. I haven't checked up on that", she wrote, but speaking later on Polish Radio overseas service in Esperanto, she acknowledged "I'm probably the first Esperantist in the European Parliament". During the recent election campaign in the UK, we found that at least three candidates had learned Esperanto, so statistically one could perhaps expect a number of previous MEPs to have some knowledge of the language. Speaking the language every day for twenty years, though, is a different matter.

[From *Esperanto Britain Newsletter*] □

AVENTUROJ DE KOPENHAGANO

Ĉerpaĵo el la aŭtobiografio

de Bob Felby¹

[Bob naskiĝis en Danlando kaj dum siaj fruaj jaroj loĝis tie, kaj tie li lernis esperanton —]

Iun ferion mi decidis pasigi en Nederlando. Mi estis aĉetinta mopedon, t.e. motorigitaj pedaloj, kaj elveturis el Danlando, tra Germanujo en Nederlando. Estis tre interesa vojaĝo. En la unua benzinvendejo en Nederlando grupo da junuloj volis mortigi min, ĉar ili supozis, ke mi estas germano.² Feliĉe venis nederlanda maljunulo, parolis al mi en tre malbona dana lingvaĵo, kaj poste klarigis al la junuloj, ke mi ne estas germano, sed dano. Tio ŝanĝis ĉion. La junuloj akompanis min longan vojon ĝis la urbo, kie loĝis mia amiko nederlanda, Felix Kat. Li estis tre feliĉa, kaj tia estis ankaŭ lia kato, ĉar mi venis. Li estis instruisto, ne! ne la kato, sed feliĉa Felix, kaj mi estis bone, eĉ bonege prizorgata dum mia kelkataga restado tie.

De tie mi iris pli suden en Nederlando. Mi laŭiris relative larĝan straton kun nur unu biciklovoĵeto, kaj tiu estis sur la dekstra flanko de la vojo. Kompreneble, por tiuj, kiuj veturis la alian direkton, ĝi estis sur la maldekstra flanko. Kia lando, tiu Nederlando, ĉu ne? Sur tiu biciklovoĵeto oni biciklis en ambaŭ direktoj, kaj mi pensis saĝe, ke tio estas tro danĝera, do mi veturigis la mopedon sur la vojo mem. Tiam venis motorbiciklo kun du grandeguloj. Ili estis policanoj. Fortaj nederlandaj policanoj kun pafiloj. Ili mangestis al mi, ke mi iru sur la biciklovoĵon. Do, malgraŭ tio, ke malplaĉas al mi obei ordonojn, mi tamen faris tion, mi ne volis, ke ekestu milito inter Danujo kaj Nederlando, estis jam sufiĉe danĝere aĉeti benzinon en Nederlando, ĉu ne?

Mi alvenis al Scheveningen, (mi esperas, ke mi ĝuste literumis la nomon de la urbeto). Tie estis policejo, kaj mi eniris por peti informojn pri la plej mallonga vojo al iu urbo, kie loĝas alia el miaj amikoj. Salutis min miaj du grandeguloj, kiujn mi jam renkontis sur la vojo. Ili demandis min pri mia deveno ktp. kaj mi demandis ilin pri la plej mallonga vojo. Satiginte miajn sciivolemojn mi daŭrigis al la urbeto. Trovinte la loĝejon de mia amiko, mi trovis sur la enirpordo noton kun la jena mesaĝo: “Ni estas en Scheveningen”, (ĉu ankoraŭ ĝustas la literumado?) Reen al Scheveningen, la vojon mi bone konis, kaj mi trovis tie feriejon konsistantan el lignaj dometoj kun tegmentoj el tenda tolo.

1. [Pli fruaj partoj de ĉi tiu verko aperis en *ESK* (1994), *ESK* 34 (1998), *ESK* 40 (1999), *ESK* 41 (1999), *ESK* 42 (1999).]

2. [La Dua Mondmilito, dum kiu Germanio okupis kaj penis naziigi Nederlandon, estis finiĝinta antaŭ nemultaj jaroj. [\[d\]](#)]

“Vizitanto el Danlando” mi ekkriis, kaj oni enlasis min, kaj ĉar estis jam nokto, mi prenis la supran liton tuj sub la tolo. Tie mi dormis kelkajn horojn, ĝis subite trafis mian kapon kapkuseno, kaj mi aŭdis la voĉon de mia amiko krieganta, “bone morgau!” Mi reciprokis per “bonan matenon” esperante ke li ne ofendiĝos. Sed li ne ofendiĝis, kaj ni ellitiĝis kaj matenmanĝis.

Ni eliris kaj rigardis la feriejon, poste ankaŭ la urbeton Scheveningen. (Ju pli ofte mi skribas tiun nomon, des pli facila fariĝas ĝia literumado.)

En la vespero la familio devis reiri al sia hejmo, kaj mi akompanis ilin. Ni biciklis, escepte de mi, kompreneble, mi rajdis aristokrate sur mopedo.

La nokte estis terure varmega, kaj mi elrampis el la lito kaj daŭrigis la dormadon sur la planko.

En la mateno mi adiaŭis ilin kaj daŭrigis mian ferivojaĝon eĉ pli suden. Nederlando estas grandega lando, eblas iri de nordo suden en ĝi.

En alia urbeto mi trovis alian amikon, kiun mi ĝis tiam ne konis. Mi restis en lia domo kune kun liaj gepatroj kelkajn tagojn. Mi loĝis en la ĉambro de lia fratino, kiu estis for feriante. Tie mi povis ripari kaj purigi la mopedon. Poste mi iris al la granda urbo de Nederlando, ĝi nomiĝas Amsterdamo. Tiu estis la unua fojo, kiam mi estis en Amsterdamo, tiu belega urbego kun reĝa palaco kaj kinejoj. Mi haltis antaŭ unu el la kinejoj, kiu reklamis pri dana filmo, en kiu aktorin fama dana aktorino nomita Ib Schønberg. Mi aĉetis bileton kaj eniris. Estis tre ege amuze rigardi filmon en fremda lando. Ib Schønberg parolis dane, kaj sube estis skribita en la nederlanda, kion li diris. Mi sidis kaj legis la nederlandan tekston dum Ib Schønberg parolis dane. La nederlandanoj ridegis, kaj mi penis por kompreni, kion signifas la nederlandaj vortoj. Estas, almenaŭ al mi, tre malfacile rigardi tekstojn kaj samtempe kompreni ilin, kiam iu parolas alilingve, eĉ kiam oni tre bonege komprenas la vortojn parolatajn. Sed eble mi povus lerni la nederlandan lingvon, se mi pli ofte enirus kinejojn, sed devus esti nederlandaj kinejoj, ĉu ne? kaj en Aŭstralio troviĝas nur aŭstraliaj kinejoj!

Mi iris hejmen la saman vojon, laŭ kiu mi venis. Nun la biciklovoĵeto estis sur la maldekstra flanko de la vojo, kaj mi do biciklis tie. Ne plu mi revidis miajn grandegajn amikojn. En Bremeno, Germanujo, mi loĝis ĉe unu el miaj germanaj amikoj. Rigardinte la bremenajn urbomuzikantojn, ili staris ekster la urbodomo kaj enrigardis, mi renkontis grupon da nederlandaj geesperantistoj. Ili aŭtobuse survojis al Kopenhago. Mi avertis ilin, ke ni verŝajne rerenkontiĝos en Kopenhago. Kaj efektive, en Kopenhago atendis min la membrogazeto de Kopenhaga esperanto-Klubo. En ĝi mi legis, ke estas en la urbo nederlandaj esperantistoj, kaj ke ili hodiaŭ vespere estos en la fame konata amuzejo, Tivoli.

Tiun vesperon mi iris al Tivoli. Mi trovis la esperantistojn, kiuj ankoraŭ memoris min. Inter ili estis ankaŭ iu junulo, kiun mi ne konis. Li kuniris

kun mi tra la tuta Tivoli, ĉar, kiel li diris, li volas paroli kun eksterlandano. Li pagis la glaciaĵojn ktp. ĝis subite li aŭdis ke mi parolas dane kun iu vendisto. “Kio en la mondo estas tio?” li demandis, “ĉu vi estas dano? Mi kredis, ke vi estas nederlandano”. “Kaj mi kredis, ke vi estas nederlandano”, diris mi. Tamen ni ne malamikiĝis, sed ĝuis la vesperon kune kun la aliaj “nederlandanoj”.

Tamen, tiun saman vesperon mi devis iri labori en la kablofabriko. Mi laboris per grandega maŝino, kiu fakte devus esti en iu muzeo, ĉar ĝi ne estis la plej moderna en la mondo. Mi devis surmeti sur ĝin multajn bobenojn pezajn. Se mi ne bone faris tion, mi riskis, ke ili elfalos, kiam la maŝino rondiros, kaj unu aŭ pluraj el la bobenoj povus flugante mortigi tiun, kies kapon ĝi trafos. Ofte, tro ofte okazis, ke la drato rompiĝis. Tiam la maŝino aŭtomate haltis, kaj mi devis kunluti la du finaĵojn de la drato.

Dum la noktoj estis neniuj estroj en la fabriko. Oni fidis nin, aŭ almenaŭ preferis resti hejme en siaj litoj. Subite sufiĉis al mi la malbona konduto de la maŝino, mi haltigis ĝin, kaj forlasis la fabrikon. La pordisto demandis min, kion mi faras tiom for de la maŝino. Mi respondis, ke mi ne plu laboras en la fabriko, kaj ke mi volas, ke li malŝlosu la pordon, ĉar mi iros hejmen. Li diris, ke mi ne povas foriri en la mezo de la nokto. Mi respondis ion al li, kaj li komencis patrece demandi min, ĉu mi jam finis mian militservon ktp. Mi diris ke ankoraŭ ne, ĉar oni ankoraŭ ne skribis al mi, kaj mi rakontis al li mian opinion pri militoj kaj perforto.

Fine li ellasis min, kaj mi iris hejmen per mia mopedo, kaj dormis ĝis la mateno.

Do, ree mi devis trovi laboron. Dungis min la Reĝa Dana Poŝtoservo, kaj mi fariĝis leterportisto. Io, kio tre plaĉis al mi.

Ĉar mi estis nur rezerva poŝtisto, mi petis ke oni dungu min kiel permanentan poŝtiston kun ruĝa jako, kaskedo, flava biciklo kaj pensio post kiam mi fariĝos 67-jara.

Oni min demandis, ĉu mi jam finis mian militservon. Mi respondis, ke ankoraŭ ne, ĉar mi rifuzas lerni mortigi aliajn homojn. Oni respondis, ke mi revenu post kiam mi estos fininta ĝin. Tio estis promeso, ĉu ne?

Estis amuze esti poŝtisto. En la matenoj oni eliras kun milionoj da leteroj, inter kiuj multaj registritaj. Estis ĉiam minimume tri registritaj leteroj al Carlsberg, la bierfarejo. Oni do eniras kaj donas ĉiujn ordinarajn leterojn al iu oficisto. Por registritaj leteroj oni ricevas kuponon permesantan al oni unu senpagan botelon da biero. Oni baldaŭ lernas prezenti nur unu registritan leteron, ricevi sian kuponon kaj foriri. Kelkajn minutojn poste oni revenas kun la dua registrita letero, ktp. ĝis la lasta. Tiel oni ricevas pli da biero, ĉu ne?

En iu fabriketo oni produktis butikumsaketojn. La posedanto estis esperantisto. Al li mi portis kelkajn esperanto-gazetojn. Li afable permesis al mi,

ke mi portu la gazetojn hejmen, legu ilin tie, kaj donu ilin al li kiam mi revenos. Li estis bonegulo. Ĉiun someron li veturigis siajn dungitojn al Jugoslavujo por ferii. Iom post iom ankaŭ ili ekkonis esperanton.

Fine oni alvokis min al du-jara punlaborado en unu el la plej grandegaj arbaregoj norde de Kopenhago. La poŝtisto sonorigis la sonorilon de nia loĝejo. Diris li, mi havas registritan leteron por vi. Nu, tio ofte okazis, ĉar mi ja korespondis kun tiom da esperantistoj en la mondo. Mi do subskribis lian libron, kaj li donis al mi la leteron. Sed ĝi estis de Satano mem, aŭ almenaŭ de la registaro, dungata de Li. Mi diris al li, “kial vi ne avertis min”, mi ne havas tempon por malŝpari kun la registaro.” “Mi sciis, ke vi diros tion”, li diris, kaj ridetis.

En la koverto estis senpaga bileto de Kopenhago al la punlaborejo. En la stacidomo mi renkontis multajn aliajn, kiuj survojis al la sama loko kiel mi.

Ni alvenis vendredon en la vespero. Sabaton en la antaŭtagmezo ni rajtis reiri al Kopenhago, sed ni devis reveni dimanĉon dum la vespero, fakte ni ĉiam revenis ĉirkaŭ la 2-a horo lundon. Mi ankoraŭ ne komprenas, kial ni devis alveni jam vendredon, nur por dormi unu nokton tie. Laŭ mia neregistara opinio, pli bone estus atendi ĝis lundo matene!

Tiam plaĉis al la dana registaro ŝajnigi sin demokrata. Ili opiniis, ke ankaŭ militrifuzantoj rajtas lerni ion. Sed ĉar mankis instruistoj, ni estis devigataj trovi ilin inter ni mem. Inter ni estis kelkaj profesiaj instruistoj. Ili kovris sian vizaĝon per granda nigra barbo, mi ne scias kial. Eble ili hontis pro la aspekto de sia vizaĝo. Ili instruis la danan, anglan, francan kaj germanan lingvojn. Mi aliĝis al ili kaj instruis esperanton al dek lernantoj. Kaj tuj, mi ankoraŭ ne scias kial, ankaŭ mi kreskiĝis barbon. Nun mi ŝuldas al mi mem klarigon. Oni ne sekvu aliajn, oni ĉiam estu si mem! Sed mia barbo ne estis bela kaj nigra kiel iliaj. Mia barbo estis malhelruĝa sur la vangoj, la lipharoj estis flavaj, kaj sur la mentono la barbo estis karotkolora. Mi ne ŝatis ĝin, kaj mia haŭto jukis kaj jukis la tutan tempon, do kelkajn semajnojn poste mi estis la ununura instruisto senbarba. Tio pruvas, ĉu ne?, ke barbo ne faras la viron!

Mi bone, eĉ bonege konis eminentan esperantiston en Kopenhago. Fakte mi konis multajn, sed tiu ĉi elstaras en mia memoro. Li estis Leonid Vasiljev, rusa militkaptito, kiu restis en Danlando post la unua mondmilito. Tre saĝa homo estis Vasiljev. Li sin vivtenis multobligante dokumentojn kaj tiajn aferojn por komercistoj en Kopenhago.

Lin mi invitis veni al la punlaborejo por prelegi pri esperanto, kaj tion li faris, kaj fariĝis tre populara inter la pacamantoj!

Vasiljev tre bonege parolis la danan, kaj mi pensis tiam, ke se mi povus lerni paroli esperanton same bone, kiel li la danan, tiam mi devus esti eĉ tre feliĉa. Mi ne scias, ĉu mia esperanto nuntempe estas tiom bona, kiom la dana de Vasiljev, sed tamen mi fakte estas feliĉa, do ion mi gajnis en la vivo!

[Daŭrigota] ◻


LA E-POŝTA ADRESO DE ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Pro pluraj problemoj, necesis ŝanĝi la retroŝtan adreson de Esperanto sub la suda kruco. Tial ni petas ke ĉiuj e-poŝtaj kaj ret-komunikaĵoj por kaj pri *ESK* estu sendataj al la adreso:

sudakruco@westnet.com.au

(kompreneble, la ordinara poŝtadreso restas neŝanĝita:

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio.)

Nuntempe la retpaĝo www.sudakruco.org ne funkcias. — 

RADIO 3ZZZ

Nia aŭstralia esperantolingva radio-programo Ĉiam aŭdebla per Interreto

Kvankam la nombro da esperantolingvaj radioprogramoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra ĉiusemajna aŭstralia esperantolingva radioprogramo unuhora aŭskulteblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe www.radio3zzz.com.au. La vario de la enhavo — muziko, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturaĵoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Kaj la lingvonivelo estas bona. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiusemajne. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — kaj la senpaga komputilprogramo RealPlayer (elŝutebla ĉe www.real.com).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉehejman esperantolandeton!

Vi ĝuos ĝin!



Por Ridigi Vin



Ĉfee la otrografio

Kaj evitendas, ke Esperanto estas multe pli facila ... kaj pli klara /ol la angla/
(Le Travailleur Espérantiste, nov 1996)

Turkaj delicoj

... post la edziniĝo kun Turka esperantisto kaj translekiĝo al Turkio

(IREJO-Bulieno, jul 1997)

[El *La Ondo de Esperanto*]

New Zealand Esperanto Association Congress 2005

At: Alpers Lodge, 16 Alpers Ave, Newmarket, Auckland.

Web page: www.alperslodge.co.nz

Email: alpeauck@fc-hotels.co.nz

Date: Tuesday 4th to Friday 7th January 2005.

Alpers Lodge has comfortable accommodation, rooms have TV, microwave, fridge, tea and coffee making facilities. There is a restaurant and plenty of off-street parking.

Cost in NZ\$: The room price is for one or two people per night, an extra adult is \$15.

Standard studio \$99. Twin rooms have a queen and a single bed, or a king size bed.

Standard budget \$79. Twin rooms have a double and single bed, or two singles.

Family Unit \$112. This has a double bedroom, a lounge with two single beds and a kitchen.

Also available are

Executive studios \$120, and multi-share rooms \$34 per person.

Newmarket is a trendy suburb with shops, cafes, theatre complex. Close to the Central City, the Auckland Museum and Domain, and Mt Eden, one of our volcanic cones.

For further information contact our Secretary, Howard Gravatt, email: hgravatt@ihug.co.nz.

Or: New Zealand Esperanto Association, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035, New Zealand.



Por Ridigi Vin



Kiel mortigi agadon

Wim de Smet postulas ... plani kaj ekzekuti aŭ nepre apogi aktivecojn en Flandrio. (Vertikale 1994, dec.)

Per la sankta amo disbatotaj

Esperanto estas la plej taŭga ilo por rompi lingvajn barelojn.

(Katinjo Fetes-Tosegi, Radio Vieno, 21 mar 1996)

[El *La Ondo de Esperanto*]

DIVERSECO KONTRAŬ MALVARIECO

de Marcelo Leereveld

Mi respondas al ideoj esprimitaj de Kep Enderby en la julia *ENK* sur paĝo 11.

La malsamaj opinioj de Kep kaj de mi pri la valoro aŭ nevaloru reteni mortoriskajn lingvojn kaj dialektojn dependas plejparte de la funkcio, kiun ni atribuas al lingvo.

Mi vidas precipe tri funkciojn: sciencan, artan, kaj teĥnikan/praktikan. Kvankam en ĉiuj tri funkcioj okazas ŝanĝado kaj evoluado, por iu ajn homa okupiĝo (kaj malrapide en ĉiu biologia aspekto), la evoluado ne nur entenas maldiversecon, sed samtempe diversecon. Kaj la diverseco povas enhavi same la novajn kiel la malnovajn formojn. Tio fakte en ĉiuj okupiĝoj. Pri lingvoj ni konstata ne nur morton de “malgrandaj” lingvoj, sed samtempe kreskon de novaj lingvoj: ekzemple la dialektiĝo de la angla, la kreo de artefaritaj lingvoj (esperanto), la renovigo de malnovaj lingvoj (hebrea), kaj la furioza peno de la kroatoj malsamigi sian lingvon for de la (antaŭe praktike egala) serba lingvo. Eĉ en esperanto mem ni konstata daŭran (kvankam nefacile rimark-eblan) disiĝon inter la *Fundamenteca* esperanto, kiun mi uzas, kaj la esperanto de multaj eŭropanoj, kies tekstojn mi malfacile komprenas pro la abunda enkonduko ante (preskaŭ ĉiam nenecesajn) neologismojn.

Sed krom la fakto, ke la homaj okupiĝoj ne nur forlasas iujn formojn kaj samtempe pliriĉigas siajn formojn, eĉ inkluzive de la malnovaj formoj, ekzistas la juĝeca fakto, ke iuj homoj preferas la diversecon kaj aliaj homoj preferas la limigitcon de la formoj. Tiuj opinidiferencoj interagadas kaj interbataladas, kaj iomete influas la direkton de la faktaj diverseco kaj limigiteco.

La malsameco de la opinioj de Kep kaj de mi pri lingva (mal)diverseco koncernas ne la faktojn, sed niajn preferojn, do ne tute objektivajn. Ili dependas pleje de tio, ĉu ni konsideras la valoron de lingvoj laŭ scienca, arta, aŭ teĥnika/socia aspekto.

Se, kiel mi, oni konsideras la valoron de lingvo laŭ arta aŭ scienca aspekto, oni certe preferas la plej grandan diversecon. Same kiel ĉe aliaj homaj okupiĝoj, ankaŭ lingvodiverseco gravas. En la arto ni bezonas ne nur la novajn stilojn, sed deziras reteni kaj admiri kaj kompreni (kaj kelkfoje uzi) la (ĉiujn) malnovajn stilojn kaj produktojn. En sciencoj ege utilas, ke bestospecoj ne formortas, kaj ke malnovaj plantoj plu haveblas por lerni el iliaj karakteroj kaj por eventuale uzi ilin por medicinaj kaj aliaj celoj. Do por mi gravas ne la kreo ante novajn lingvojn kaj ante internaciajn lingvojn, sed ankaŭ la reteno de la kulturo de malnovaj aŭ malmulte uzataj lingvoj, se iliaj popoloj tion deziras, kaj se tion atakas pli fortaj potencoj (turka registaro kontraŭ kurda lingvo). Mi do konsideras la lingvon kiel artaĵon kaj same sciencaĵojn same kiel utiligaĵojn. Kaj principe mi ne trovas la francan lingvon en si mem kaj

por la francoj pli valora ol iun formortantan lingvon aŭstraliindiĝenan en si mem kaj por ĝiaj parolantoj. Mi malakceptas valorjuĝi malsame la etnajn lingvojn, sed juĝe komparas la etnajn lingvoj kun artefaritaj lingvoj, ĉar ĉi lastaj faratis nur pro sia utileca valoro, kvankam tre malgranda iometo da kulturo jam montriĝas en esperanto.

Kontraŭe al tio, Kep (kaj Don), ŝajne precipe, se ne sole, konsideras lingvon kiel teĥnikaĵon, kiel nuran komunikilon, kiel simplan ilon, same kiel aritmetikon kaj aŭtomobilon.¹

Se Kep deziras, aŭ almenaŭ ne kontraŭbatalas, la evoluon de la lingvoj en ĉi tiu malvasta senco, li konsekvence esperas la foriĝon de ĉiuj lingvoj escepte de unu², kaj li konsekvence ankaŭ ne kontraŭas la formorton de arbaroj kaj de la sovaĝaj postrestaĵoj de nia “civilizacio”.

Ne utilas diri, ke en la pasinteco multaj lingvoj malaperis, kaj ke sekve ni devos akcepti tiun disvolviĝon ankaŭ en la estonteco, ĉar same ni povus diri, ke en la estinteco okazis militoj, do ni devos akcepti pliajn, aŭ ke pluraj bestospecoj ekstermatis de la homaro, kaj ke do ni akceptu ke tio daŭru.

Sed eĉ el socia/utileca vidpunkto ni daŭre povas ankoraŭ lerni el la t.n. primitivaj (eĉ el la bestaj) socioj kaj utiligi ilin, dum ni progresas. Ambaŭ malnovaj sociaj idealoj daŭre plu influas niajn nunajn kaj niajn estontajn idealojn sociajn.³

Mi trovas bonŝanca, ke la esperantistoj ĝenerale juĝas lingvon, iun ajn, ankaŭ kiel artaĵon kaj sciencaĵon (same kiel la ekologian aspekton), kaj tial favoras la diversecon ne nur per la aldono ante esperanton al la lingvaro, sed ankaŭ la praktikan retenon de la mortoriskaj lingvoj, kaj pretas batali por tiu reĥeno, malgraŭ la deziroj de politikaj, sociaj, kaj precipe komercaj potencoj detruai la diversecon.

Eble mi skribis la ĉisupron sen neceso, ĉar mi sentas ke Kep samopinias kun mi, sed diris senpripense ne siajn sed el Lapenna/Moya. □

1. Jes, vi pravas pri tio. Mi tute ne komprenas kiel kaj kial la vivo/morto de lingvo (mal)daŭrigas la kulturon de la parolint/antoj. Proverboj, literaturaĵoj, kantoj, agkutimoj, kc. transiras alilingven tre sukcese. (Kiom da proverboj, verkoj, kaj kantoj konsiderataj de angleparolantoj kiel origine anglalingvaj efektive originis en alia lingvo!) Kulturo estas la sinesprimo de popolo, kaj neniel dependas de la lingvo uzata. Ne ekzistas “pensmaniero specife” franclingva, aŭ ĉinlingva, aŭ nahŭatla. Certe ekzistas ideoj franc-, ĉin-, aŭ nahŭatla-devenaj, sed iliaj naturo kaj valoro restas neŝanĝita, negrave en kiu lingvo ni ilin konas. Ekzemple, la koncepto “nulo” estis enkondukita en nian matematikon el arablingvaj verkoj, sed ĝia kultura/scienca/arta valoro ne estas specife arablingva. — [db]
2. Kion volas Kep, mi ne scias. Sed laŭ mi mem, la ekzisto de nur unu lingvo en la mondo estus grandega paŝo al la unuigo de la popoloj de la mondo, la ĉesigo de naciismo, kaj la nuligo de la “malamiketo de las naĉes” [Zamenhof].—[db]
3. Lingvo estas arbitra sonaranĝado por komuniki, ne “natura” fenomeno. Lingvuzo originis antaŭ nur ĉ. 60 mil jaroj (maksimume 100 mil). Dirajo malaperas tuj kiam dirata, ĝi ne havas ekziston, nur okaziĝon.—[db]



Recenzas via redaktoro



Kenneth G. Linton: *The Friend from Kananam; Adventures in the New Guinea Jungle*. Translated into English from the Esperanto original which was titled *Kanako el Kananam*. Bilingual Edition. Tr. P.L.U. [Pierre Ullman] & V.P. [Vera Payne]. Victoria B.C. [Canada]: Trafford Publishing, 2004. Paperback, 239 large size pages. Prezo: US\$20.20.

Overall evaluation: 🍷🍷🍷🍷

The book consists of a corrected reprint of Kenneth Linton's 1960 book *Kanako el Kananam* with an English translation on facing pages. Technically the book is well made, although the page size 203x254mm (= roughly A4) makes it rather unwieldy to hold. A small number of line drawings, taken from the original 1960 edition, illustrate the text. There is a fair number of misprints which escaped the proofreader, in both the Esperanto and the English sections, but they are unlikely to disturb the reader.

Linton's book was based on letters he wrote home while serving in New Guinea during the Second World War. His Esperanto style and vocabulary are relatively simple, making the Esperanto text suitable for reading by students with, perhaps, a year's worth of Esperanto study behind them. They will also find the parallel English translation helpful, when they get stuck in understanding Linton's writing.

The translation is very well done. Linton's non-literary style comes across well, and for the most part the English text is faithful to the original. I would prefer that a number of very subjective vocabulary "corrections" to Linton's Esperanto text had not been made, although, of course, the English reader is unaware of them. In the introductory pages, a few alterations in the interest of "political correctness" have been made for the English reader, which rather misrepresent attitudes of the time. Frank Banham's reference to "Eŭropanoj", which the translation has rendered "members of Western civilization", is an example. Whether or not we like Banham's particular version of the Australian prejudice that it's "us against them" (Europeans vs. the rest of the world), he said what he said, and we should accept that as a historical fact.

Essentially, *Kanako el Kananam* is more or less a tourist's account of how Linton found local customs and people in one particular part of New Guinea in the early 1940s. He had a great admiration for the "natives", and took pride in learning Pidgin in order to communicate with them. As a "westerner" he, particularly at first, saw himself as a superior species — he thought nothing of walking unannounced into a local settlement, and then entering a

family's house uninvited; he was surprised that the resident not only did not like finding an intruder in his home, but also reacted accordingly. There is a naivety in Linton's attitudes to the New Guineans which may strike the reader in various ways, depending on our own views. In any event, Linton seemed enlightened for his time, even if we find his prejudices rather objectionable now. Presumably it can be said that he was a child of his time, and he meant well, whether or not that really is a valid excuse.

I doubt that many English readers will take up the book — bilingual editions rarely have much appeal for the public. But as I said above, the volume can be useful for students of Esperanto who can profit from plowing through a relatively simple but interesting original Esperanto narrative on the left hand pages with a handy crib on the right hand pages to consult when they find themselves in difficulty. □

Katalin Kováts (Redaktoro): *Edu-KoDo: edukado.net: katalogo — lerniloteko — ekzamenoj*. Kompaktadiska versio de la paĝaro www.edukado.net. Prezo: €16 (\$25 aŭstraliaj) inkl. sendkostojn. Menu ĉe: <redaktanto@edukado.net>.

Takso: 🍷🍷🍷🍷.

Tute en esperanto, ĉi tiu utilega kompakta disko, finredaktita komence de majo 2004, estas utiligebla per ĉiuj komputiloj, pere de via preferata ret-legilo¹. Partoj de la disko estas en pdf-formo²; se via komputilo ne jam kapablas legi pdf-tekstojn, la kompakta disko ankaŭ enhavas Windows-version de Acrobat Reader, por legi ĝin. (Modernaj Macintosh-komputiloj aŭtomate povas legi pdf-aĵojn.)

Por ekuzi la diskon, Macintoshistoj mus-klaku sur la vorto “index.html” en la diskotabelo de enhavo.

www.edukado.net estas interreta sito kiu enhavas ĉiaspecajn informojn kaj lernilojn pri esperanto. Ĉi tiu kompakta disko reproduktas la enhavon de tiu retsito, kia ĝi estis malfrue en aprilo ĉijara. Krome, ĝi ankaŭ enhavas la tutan PMEG-on (*Plena manlibro de esperanta gramatiko*) verkitan de Bertilo Wennergren. La kompakta disko utilas kaj por personoj kiuj ne povas facile kontakti kaj uzi Interreton, kaj ankaŭ por personoj kiuj volas havi ĉemane informojn pri esperantaj lernolibroj (kun detala indiko pri ilia enhavo, iliaj celataj aĝgrupoj, ktp.). Enestas ankaŭ amasego da ekzercoj kaj tekstoj longaj

-
1. Netscape, Internet Explorer, Mozilla, Opera, Safari, kc.kc.kc.
 2. “pdf” = portebla dokumento-formato: speciala formato kiu, uzebila per ĉiuj komputiloj, kapablas reprodukti surekrane libroformajn tekstojn kaj bildojn. Multaj miloj da libroj kaj aliaj verkoj nun haveblas en pdf-formo. Tiujn tekstojn oni povas legi uzante senpagan pdf-legilon. Da tiaj legiloj ekzistas pluraj; la senpaga Acrobat Reader de la firmao Adobe (kiu inventis la pdf-on) estas plej populara, sed ekzistas ankaŭ aliaj senpagaj pdf-legiloj facile haveblaj.

kaj nelongaj, kompleksaj kaj simplaj, por novuloj, komencantoj, progresantoj, ĉiaj lernantoj. Estas malfacile tro alte taksi ĉi tiun edukodiskon, kiu valoras egale por edukistoj kaj por lernantoj. Unusola averto necesas: ĉar la disko estas preskaŭ tute en esperanto, por utiligi ĝin vi devas legkompreni esperanton, aŭ esti helpata de tia kapablulo. □



Skribas la legantoj



Skribas Volo Gueltling:

Pri la propono de s-ro Leereveld pri la landnomoj, sendube li legis la libron de s-ro d-ro Albaut, kiu siatempe estis la prezidanto de la lingva akademio. Tiuj proponoj nur kaŭzus grandan konfuzon en la esperantistaro. D-ro Albaut bazis sian proponon sur la nacilingva uzo de la landnomoj, ekz. Germane *China*, angle same, france *Chine* ktp, do *Ĉino* por la lando kaj *ĉinano* por la homoj vivantaj tie. Marcelo Leereveld ankaŭ proponas uzi “ujo” por granda parto de la landnomoj. Tio estas stranga, ujo jam havas 3 signifojn kaj Marcelo ja starigis 4 novajn regulojn por elimini la uzon de “de”. Ujo ja estas uzata por fruktarboj: pomujo, ĉerizujo ktp; ujo por enteni iujn varojn; kaj kiam Zamenhof uzis ĝin por landnomoj, la problemoj komenciĝis. En siaj lingvaj respondoj li skribis, ke li uzis Belgujo kaj Brazilujo, sed konstatas ke tio devus esti Belgio kaj Brazilio. Kaj nun venas la konfuzo de UEA! Pro la konstruo de la nova urbo Brasilia, prononcata Brazilja, kio ja ne konfliktas kun la prononco de Brazilio. Pri Belgujo kaj Rusujo, en la unua ja vivas du gentoj, la valonoj kaj la flandroj, franclingva kaj nederlandlingva. En Rusio ja vivas multaj gentoj kiuj same parolas siaj proprajn lingvojn. Neniel ni bezonas sekvi la nacilingvan uzon por landnomoj. Ni havas propran lingvon, esperanto. Estas facile trovi solvon por niaj bezonoj. Kial ni ne plu uzu Belgio, Brazilio, Francio, Italio ktp? Kial ni devas diri Pakistano se Pakio ja sufiĉas? Ni ja ankaŭ uzas Danio anstataŭ Danlando, en la dana lingvo Danmark. Tamen unu escepto: Lichtenstein estas la familia nomo de la grafo kies familio supozeble ankoraŭ regas la landon. □



Por Ridigi Vin



Sen gener(aci)a baro

La jaro 1993 donis al mi kortuŝan surprizon: mia filino faris al mi avinon.

(Olga Peña, en *Antaŭen*. 1994: 1)

[El *La Ondo de Esperanto*]

FOR THE BEGINNER

JARGON (3)

by Donald Broadribb

Hopefully helpful explanations of what grammatical terms mean, for those who were never drilled in the Latin-Greek based analysis of English that used to be demanded of high school students until around 30+ years ago.

[Participles: a couple of final notes]

To express the idea “by” after -ata, -ate, -ita, -ite, -ota, -ote, the word “de” is used. For example: Ĉi tiu gazeto estas redaktata de Donald Broadribb = “This magazine is edited by Donald Broadribb”. Letero manskribita de Mark Twain havas multan valoron = “A letter handwritten by Mark Twain is very valuable”.

Since the word “de” in other circumstances may mean “from”, you need to remember that there could be misunderstanding, and take care. For example, Letero sendita el Melburno = “A letter sent from Melbourne”.

Grammarians traditionally distinguish the participles as forming two groups:

Active: those made with -ant-, -int-, -ont-.

Passive: those made with -at-, -it-, -ot-.

In some languages there is a category of “past participles”. This category does not exist in esperanto, although it does in English.

Particle: This refers to a tiny word that has no particular ending and can be used in all sorts of functions in speech or in writing. Although in English grammarians usually assign these little words to a wide variety of categories, Esperanto grammarians often prefer to lump them together in a catch-all category called “Partikuloj”. Examples include ne, nur, ja, dum, and dozens of others.

Passive and medial:

These terms are used loosely and misleadingly, by grammarians who think of Esperanto grammar in terms of the Greek-Latin tradition.

In Esperanto, passive refers only to the participles discussed above.

“Medial” does not apply in Esperanto grammar at all. Some grammarians use the term in regard to the use of **-iĝ-**; they are confusing **-iĝ-** with medial verb forms in ancient Greek and to some extent classical Latin. Those verb forms had essentially a different function. **-iĝ-** means “to come into a state of...”. For example: Li stariĝis = “He stood up” [came into a state of standing]. La Ŝtono Rosetta skribiĝis en du skribsistemoj

= “The Rosetta Stone came to be written in two writing systems” [came into a written state]. La pordo malfermiĝas = “The door opens” [comes into an open state].

Although with good intentions, many textbooks mistakenly say that -iĝ- makes a transitive verb intransitive; and -ig- makes an intransitive verb transitive. This claim comes from a futile attempt to find something similar to -iĝ- and -ig- in other European languages; in reality, it is a serious misunderstanding both of the *Fundamento de esperanto* and of usage in normal Esperanto.

Person: In many languages, verbs are made differently depending on which *pronoun* is used or intended. In many languages this makes *pronouns* optional in most cases. Traditionally, in those languages, verbs are made differently depending on whether the pronoun is:

“First person” = I or we

“Second person” = you

“Third person” = he, she, it, or they.

English for the most part distinguishes two sets of “persons of the verb”: I, we, you, or they **go**;

but he, it, or she **goes**.

No such verb changes exist in Esperanto.

Phrase: A group of words, which together express one big thought.

In English, a phrase may be a sentence, or just be part of a sentence. For example, “He spoke to his daughter yesterday and told her he would buy her a new bicycle” is considered to consist of two phrases which are combined by the use of the word “and”. “He said he would buy her a new bicycle.” is considered to be a sentence, as well as a single phrase.

Other languages have other ways of dividing up phrases, and in some languages phrases are always separated by commas. Esperantist writers from those language backgrounds use so many commas that English readers sometimes get lost. On the other hand, esperanto writers from an English background tend to use commas sparingly, and this sometimes confuses readers from other backgrounds.

There is no rule in Esperanto on how commas are to be used.

Generally speaking, Zamenhof, the initiator of Esperanto, made no distinction between phrases and sentences, but called them all simply “frazoj”.

Plural: More than one of something. “Cow” = singular (= one cow); “cows” = plural (= more than one cow).

In Esperanto, both adjectives and nouns make a distinction between singular and plural: “granda libro” = “big book”; “grandaj libroj” = “big books”.

Generally speaking, Esperanto plurals pose no problems for English speakers, but there are a few pitfalls to avoid:

Very occasionally English uses a plural but Esperanto does not: “pants” and “trousers” = pantalono; “shorts” = kuloto; and a very few other terms. Dictionaries normally point out the difference, when you are looking up the terms in an English-Esperanto dictionary.

Sometimes Esperanto uses a plural when English has no plural word: ŝafoj = more than one sheep, just one sheep is “ŝafo”; unuj = “some”; oni may be considered either singular or plural in esperanto, depending on your own personal preference. In English “one” is never used as a plural. There are a few other possible examples.

Possessive: In grammar this term refers to a very different concept than its usual meaning in English.

English has a special possessive case, which is also often called the genitive case. It usually consists of placing ’s on a *noun*: “John’s”, “the dog’s”. In a few instances the spelling has special variations: “whose” (instead of “who’s), “The Jones’s house” or “The Jones’es house” or even “The Jones’ house”; for example. And some words are considered possessives in and of themselves: “my, mine, your, his, our,” and a few others. In many instances we are permitted to substitute the little word “of”: “the book’s cover” = “the cover of the book”; or even to use both the word “of” and ’s: “Where did I put that book of Mary’s?”

In Esperanto, as a general principle which does have some exceptions¹, there is no actual possessive case, and we must use the word de = “of”: La libro de Johano = “John’s book”; La domo de la Jonesoj = “The Jones’es book”; tiu libro de Mario = “that book of Mary’s”; la kovrilo de la libro = “the book’s cover”.

Occasionally we can make a compound word instead of a separate possessive: la librokovrilo = “the book cover” or perhaps “the book’s cover”; la libroteksto = “the text of the book”. But such usage is a stylistic variant which is not always to be recommended.

Sometimes it may mistakenly be thought that an adjective serves as a possessive. “La reĝa naskiĝtago” or “la reĝina naskiĝtago” really means “the regal birthday” and is not a true translation of “the Kings/Queen’s

1. The exceptions are the following words: ies, kies, ĉies, nenies, mia, cia, via, lia, ŝia, ĝia, nia, ilia, onia, (each of them ending with or without j and/or n), all of which are possessives.

birthday”. “Estra decido” = “an executive decision”, which is not exactly the same as “decido de la estro” = “the executive’s decision”.

Predicate: In Esperanto grammar this word is used in a somewhat different way than grammarians of the English language mean it.

Esperanto grammarians speak of a “predikato” as meaning a word or a group of words which acts as if taken together it were a complete single thought. For example, **Pluvas.** = “it’s raining”; in English we cannot use a simple verb all by itself; in Esperanto this can sometimes be done. Another example: **Ŝi ŝajnas juna** = “She seems young”; a simple “she seems” does not appear to express anything, but “seems young” does express a unit of thought.¹

To what extent this sort of analysis is really suited to analysis of Esperanto is worth some contemplation. To my own mind, it seems to be a misunderstanding of the essential nature of Esperanto grammar.

Predikativo: There is no simple English word corresponding to this concept. The definition given in *La nova plena ilustrita vortaro de esperanto* can be summarised as follows (in translation):

“A word whose function, by means of a verb, is to express a quality of a noun or adjective. For example: *La tago estas bela* = “the day is beautiful”; *Mi fariĝis kapitano* = “I became captain”; *Ne nomu min reĝido* = “don’t call me a prince”; *Oni ne povas supozi neekzistantaj tiajn faktojn* = “You cannot claim those facts nonexistent”.

The point of this is that although usually Esperanto grammar requires that an *adjective* “agree with” its *noun*, meaning that it ends with -j or -n or -jn if the *noun* does, there are instances where this does not happen. Beginners often get very confused about this. But compare these two sentences:

Oni ne povas supozi tiajn faktojn neekzistantajn

Oni ne povas supozi tiajn faktojn neekzistantaj

The first one, with *neekzistantajn*, means more or less: “You cannot imagine such nonexistent facts”;

The second one, with *neekzistantaj*, means more or less: “You cannot imagine such facts nonexistent”. — We can, if we like, think of the lack of a final -n as a short way of leaving out the word *esti*: *Oni ne povas supozi tiajn faktojn esti neekzistantaj*: “You cannot imagine such facts to be nonexistent.

[to be continued] □

1. Examples taken from *La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*.

DU NEKROLOGOJ

DESMOND J. LANGMAN 1928-2004

verkis Dave Dewar

Des Langman forpasis en Christchurch je 28 majo 2004.

Des estis aktiva ano de Christchurch Esperanto Society dum periodo de pli ol 20 jaroj. Li ankaŭ estis ano de NZEA, kie pro lia granda scio de la lingvo esperanto, li havis dum multaj jaroj la postenon de Ĉefekzamenisto.

Des estis aktiva en UEA; li estis Delegito por Christchurch, kaj Fakdelegito dum multaj jaroj, kaj partoprenis en la UK en Beijing, Ĉinio en 1986.

Li naskiĝis en Britio en 1928 kaj servis en la brita armeo. Dum li servis transmare li lernis la Malajan lingvon kaj uzis ĝin por interpreti.

Ĉirkaŭ 1955 li venis al NZ kaj poste renkontis la virinon kun kiu li edziĝis. Lia edzino mortis antaŭ kelkaj jaroj, sed Des postlasis filon kaj du filinojn.

Ni memoras lin kiel tre afablan, entuziasman kaj lertan esperantiston kaj personon kiu interesiĝis pri multaj temoj. □

MORTIS STAN BRUTON

laste loĝinta en Castlemaine, Viktorio

verkis Marcel Leereveld

Stan tre bone regis nian lingvon, prenis parton en pluraj kongresoj, same kiel en multaj kuvenoj de la Viktoria Federacio, malgraŭ ke li loĝis longe for el Melburno. Li havis helpeman kaj mildan karakteron, kaj ĉiam juĝis siajn kunhomojn favore kaj simpatie.

Li tre kuraĝigis sian multe pli frue mortintan edzinon Audrey verki la biografion pri Frank Reginald Banham, longdaŭra eldonisto de *The Australian Esperantist*.

Stan akcidente (eble pro koratako) dronis en viktoria lago dum grup-ekskurso. Li tre mankos en niaj kunvenoj. □

GASTIGANTOJ BEZONATAJ POR PASPORTA SERVO

Mi estas la kompilanto de Pasporta Servo de TEJO (<http://www.tejo.org/ps>). Eblas uzi Pasportan Servon en multaj landoj, sed la gastigantoj estas tre mal-egale distribuitaj. Duono de la landoj havas nur tri gastigantojn aŭ malpli, dum duono de la gastigantoj loĝas en nur dek landoj! Tial mi nun skribas al vi, ĉar mankas gastigantoj por Pasporta Servo en via lando.

Mi esperas ke vi povos membriĝi en la servon en via lando, por ke pli da esperantistoj povu ĝui la servon, kaj/aŭ fariĝi gastiganto. Pli da esperantistaj vizitantoj al viaj lando signifos pli da agado, pli da praktikado kaj pli da entuziasmo. Kaj espereble ankaŭ pli da homoj el via lando uzos la servon por mem vojaĝi kaj sperti la avantaĝojn de internacia gastigado per Pasporta Servo, kaj tiel ankaŭ la avantaĝojn de esperanto.

Se vi deziras informojn, ne hezitu kontakti min. Mi volonte sendos paperajn aliĝilojn.

Limdato por la venonta eldono 2005 estos kiel ĉiam la unua de novembro.

Mi antaŭdankas pro via helpo.

Derk Ederveen, kompilanto de Pasporta Servo de TEJO:

pasperv@wxs.nl



URĜA VOKO SAVI LA ESPERANTAJN DISSENDOJN DE RADIO3ZZZ

Dum la lastaj dudek jaroj entuziasmaj voluntuloj, kaj aparte Svetislav Kanacki, evoluigis la semajnan dissendon per esperanto el 92.3 FM ZZZ (Radio 3ZZZ). Ĝi estas nun dissendo fiera je monda nivelo. Espereble vi ĉiuj scias ke nun per www.3zzz.com.au oni povas aŭskulti la dissendojn ĉie en la mondo, je iu ajn tempo. Pli junaj dissendantoj nun planas kaj prezentas la programon kaj Svetislav (preskaŭ) emeritiĝis. Multajn dankojn al ili ĉiuj.

Tamen, ĝuste nun kiam ni sukcesas, ni tre facile povos perdi la rajton dissendi. Ni estas en tre danĝera situacio!

Kion ni devas fari:

Por konservi membrecon en 3ZZZ ni devas havi almenaŭ 40 pagantajn membrojn. En la pasintaj jaroj la membraro estis plejparte el Viktorio. Kelkafoje, por gajni sufiĉajn membrojn, iu membro pagas por siaj familianoj. Se ni ne povos gajni membrojn el aliaj provincoj, tiam nia dissendo-grupo ne povos daŭri.

Eble, se vi havos financon intereson en 3ZZZ, tiam vi aŭskultos kutime kaj eĉ helpos per sendi sonbendon ktp al la dissendantoj!

Membreco kosta \$15.00 (\$10.00, se vi estas pensiulo).

Pagu al 3ZZZ, P.O. Box 1106, Collingwood Vic 3066.

Aŭ, se vi preferas, pagu al Hon. Kasisto, Esperanta Grupo de 3ZZZ, 63 Kennedy Road, Somers Vic 3927. □

INTERNACIA FOTOKONKURSO

Post ses sukcesaj konkursoj (1998, 1999, 2000, 2001, 2002, 2003) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la sepa Internacia Foto-konkurso.

La konkurso ne estas ligita al deviga temo.

En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 10x15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptotaj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La fotoj devas atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2004.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis premiitaj aŭ publikigitaj.

La juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.

2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de eEsperanto* 2005.

3. Abono de *La Ondo de Esperanto* 2005.

Specialan premion (libroj de Sezonoj kontraŭ ekvivalento de 50 eŭroj) ricevos la plej bona foto teme ligita kun esperanto.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2004. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2006 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. □

EL LA REGIONOJ

S.A.: Estas Adelajdo urbo tre gratulinda, ĉar troviĝas en ĝi ne nur unu esperanto-societo, sed tri. La unua estas “Esperanto en Sudaŭstralio”. Unu el la aliaj du bonege kunlaboras kun ni, ĉar ĝi edukas kaj instruas la plej multajn el niaj membroj.

Tial estas nur nature, ke ankaŭ ni helpu, kiam helpo bezonatas. Ne nur esperantistoj helpemas, sed ĉiu normalulo tion faras.

La alia, malpli granda grupo, nun bezonegas helpon, ĉar ĝi sukcesis starigi esperanto-kurson en la Universitato de la Tria Aĝo. Ankaŭ tio estas gratulinda! Nuntempe unu el niaj membroj tial aktivigas kiel instruisto en la Universitato de la Tria Aĝo. Bedaŭrinde la instruado en U3A okazas vendredojn, kiam Esperanto en Sudaŭstralio kunvenas en la Komunumejo en Nordadelajdo, kvankam nur la unuan vendredon de la monato.

Gravas ke ni regule partoprenas en tiu kunveno, ĉar ni ĝuas multajn avantaĝojn tie, ekz. fotokopiadon ktp. La renkontiĝejo en Nordadelajdo estas granda kaj belega, ĉar antaŭ nelonge oni metis en ĝin tute novan plankon. Ankaŭ la aliaj du grupoj estos bonvenaj partopreni en ne nur niaj kunvenoj, sed ankaŭ en la zamenhoffestoj!

Estus eĉ tre bone, se la aliaj du grupoj, aŭ almenaŭ unu el ili, decidus fari siajn instruadojn en la Komunumejo en Nordadelajdo, tiam ni ĉiuj povus profiti, ĉar kunlaborante ĉiu profitas, ĉu ne?

Baldaŭ estos en Adelajdo kvara esperanto-grupo, grupo por gejunuloj, kaj tiu grupo meritos la subtenon de ĉiuj el ni!

Mi petas niajn membrojn pripensi tion, ke Keith, la komunumejestro, iras hejmen ĉiutage je la 13-a horo. Do, post tiam la Komunumejo estos fermita. Necesas tial, ke almenaŭ unu el ni estu tie iom antaŭ la 13-a horo. Se ne, ne eblos al iu ajn eniri. Kaj se ni ne uzos la Komunumejon, tiam ni perdos la rajton al la fotokopiilo, kaj tio estos la fino de *Tamen Plu*, ĉu ne? Ne ĉiam estas amuze alveni antaŭ la 13-a horo nur por atendi ĝis la unua el vi venos je la 13.45-a horo.

Okazos en Adelajdo la 20-a Somerkursaro kaj 21-a Kongreso de AEA, kaj estus bone se ni ĉiuj povus paroli esperanton tiam. Tial gravas, ke ni ĉiuj ĉeestu niajn kunvenojn por praktiki nian lingvon. [El *Tamen Plu* julio 2004.] ☐

AEA MEMBERSHIP

The A.E.A. warmly welcomes the following new members:

- Jay Grant (AE) 24 Jacksonia Drive, Seventeen Mile Rocks QLD 4073
- Amelia Bannan (AEK) PO Box 217, Forster, NSW, 2428

- Mary Mills (AE) 9 Darcy Place, Orange, NSW, 2800
- Tony Peterson (AE) 41 Curry Street, Wallsend NSW 2287
- Serene Tay (AE) Unit 302 , 2 - 12 Smail Street, Broadway NSW 2007
- Galina Sliwa (AEK) 6 / 117 Old Perth Road, Bassendean WA, 6054
- Ruth Philp, (AE) 17 Jevons St. The Gap, QLD, 4061
- Leigh & Keith Jurgs(AE&FM) 87 Lascelles Ave. Warradale, S.A. 5046
- Mrs. G. Bristow (AE) 14 Hawkes St. Ridgehaven SA 5097
- John & Elrae Adams (AEK&FM) 1/9 Fisher St. Torquay Vic. 3228
- Kevin Yeoh Kok Hoey (ESK) Kuala Lumpur, Malaysia

John Harvey

After travelling around the 'top end' and some time in hospital, John & Glenys have moved to Lady Brand Lifestyle Village, 3 Lady Brand Drive, Greenfields WA 6201.

Libroservo

This year the administration of the Libroservo has been carried out by Daniel Forrest in Bussleton, Western Australia. Daniel has made a great contribution to our Association however he is no longer able to fill this role due to ill health. The AEA thanks Daniel and wishes him as rapid recovery.

The Libroservo will now be managed by Nicole Else at Esperanto House, 143 Lawson Street, Redfern, NSW 2016

We have been notified that some members have not received magazines and/or other subscriptions. We apologise for this and request that they contact Nicole at the above address or Telephone 02 9319 4775 or email:

libroservo@ans.com.au.

Oceania Commission

Further to the article in the previous *ENK* 69 (Majo-Junio 2004, p.29-30), donations to support the Oceania Commission have already been received from the Toowoomba Esetanto Assoc., Jenny Bishop, Hazel Green. □

MONATO

nun 25-jara!

Monato, la internacia magazino sendependa, redaktata kaj eldonata en Flandrio, serĉas korespondantojn-kunlaborantojn en via lando.

Taskoj de la kunlaborantoj-korespondantoj:

Al *Monato* disponigi artikolojn (ne tro multajn: 3 ĝis 6 jare) pri io interesa en via lando, ekz. elektoj, politikaj ŝanĝoj, kulturaj aferoj, turismo, socia

vivo, ktp. Tekstoj estu verkitaj de la kunlaboranto mem kaj poste senditaj kiel simpla retmesaĝo en la x-formo. Se eblas, bildoj pri la priskribata afero akompanu la tekstojn.

Rajtoj de la korespondantoj-kunlaborantoj:

- senpaga abono al *Monato*,
- kaj ankaŭ honorarieto por ĉiu artikolo sendita.

Por pliaj informoj, bonvolu rilati kun la redakcia sekretario: Paul Peeraerts
monato@fel.esperanto.be

Certe per via kunlaborado kun *Monato* vi tiel konigos vin kaj vian landon al la tuta mondo. Plie vi perfektigos vian lingvoscion, kaj krome povas ricevi rekompenceton. Provu kaj vi vidos mem! □

♠ ♥ ♦ ♣ *Odlo Bokserp* ♠ ♥ ♦ ♣

Kiel vi povas vidi per la ĉisupra rubrikotolo, mi pasigis la ĵuspasintajn monatojn en grava Konferenco pri la Bonfarto de la Financa Mondo (*KOBOFIMO*, okazinta en la kelo de Hotelo Hilton-Sigismundo sur Insulo Sankta Georgo de Bahamaj Insuloj.

Feliĉe mi malsukcesis perdi mian helikopteroflugbileton, kaj elpruntinte miajn lastajn dolarojn al mia subite riĉiĝinta kunkartulo mi prenis ŝinkosandviĉon nur iomete musmorditan el la ĉeporda rubujo, kaj enrampis la ŝraŭbhelicflugaviadmaŝinon sufiĉe akurate por, post trihora atendado surtera, enaeriĝi kaj transsuperaernavigadi la maron sufiĉadistancen por atingi iun lokon kies nomon mi neniam ekkonis, kaj tie komenci mian piedmarŝpromenadiron reire al Aŭstralio — haltonte nur kelkajn monatojn en Salburgo kie mi penstrebklodoprovoplene ne trovos kanguruojn, ĉar miskompreninte min la vojaĝveturagentfilidungitino vendis al mi bileton al Aŭstrio — bileton, kompreneble, ne necesan por la piedmarŝpromenadiro sed por la transakvperŝipveturo transatlantika, post kio, elirinte Aŭstrion, mi la pacifikoceanapudbordĉeestantan remboaton utiluzmanipulilis ĝis Aŭstralio, renkontote de nia ĉiamĉarma koloskora pardonplenumema sensaĝestulta Reaktoro...kaj jen mi!

Diu 116-vorta alineo (neniel paraĝrafo, ne eĉ paraĝingrafo) akirigus por mi la Breskaŭnobelliteraturopremion de la jaro 2005 se nur ĝi estus aperonta en 2005, sed nia fuŝReaktoro mislegis la kalendaron...kaj ve! mia kapo doloregas post tiom da ŝencerbumado, do mi enlitiĝos nun kaj reregalos vin en la venonta numero de nia plej-prestiĝa enigmet-enhava long-legaĵa rav-revuo. — **OB**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.au>

Prezidanto: Matthew Maguire, 9 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

Vicprezidantoj:

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249
sandor.horvath@unisa.edu.au

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.
esperanto@education.mon.ash.edu.au

Sekretario: John Gallagher, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com

Helpsekretario: Henry Broadbent, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731.
henry_b@peninsula.hotkey.net.au

Kasisto: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. pitney@goldenit.net.au

Helpkasisto: Ken Rolls, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149.
kenjohn_rolls@yahoo.com.au

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 for familiano[j]) ĉe la sama adreso; \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Sendu vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: Bradley McDonald, ĉe la asocia adreso. bradley.m@xtra.co.nz

Sekretario: Howard Gravatt, ĉe la asocia adreso. hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara).

Klubo: \$1 por ĉiu ano. Sendu vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 📠 (08) 9641 1134.

sudakruco@westnet.com.au

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK* on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ESK*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtosendkosto; por nemembroj, \$4.25+poŝtosendkosto. Menu de la Libroservo.

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralio Esperanto-Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉi alia en ĉi tiu gazeto estas ©2004 de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata.

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparo uzita estas Junicode.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to
D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

Esperanto sub la Suda Kruco
Vol. 12, No.5, Septembro-Oktobro 2004

Print Post Approved
PP631048/00005

**SURFACE
MAIL**

**POSTAGE
PAID
AUSTRALIA**